# POR LA INDIĜENOJ

1ª jaro.
N-ro 1.
Januaro 1923.

Esperanta Bulteno aperanta 6 foje jare.

Prezo por 6 numeroj 1 svisa franko.



Esperanta Bulteno eldonata de la Internacia Oficejo por Protektado de la Indiĝenoj (kolorrasoj): 30, rue Verdaine, Genève, Svis.

**Ĉu la homaj rajtoj ne estas aplikeblaj al ĉiurasaj kaj ĉiukoloraj homoj?**

## Nia celo.

La sukcesa batalado de kuraĝuloj kiel Wilberforce kaj Lincoln kontraŭ sklaveco de nigruloj forigis tiun maljustaĵon el la juro, sed ne plene detruis en faktoj la espluatadon de indiĝenaj gentoj. Ankoraŭ hodiaŭ, en diversaj teritorioj ekzistas senskrupulaj monserĉantoj, kiuj profitas la malproksimecon de publika kontrolo por laborigi perforte sendefendajn loĝantojn de l' arbarego en Afriko aŭ aliloke.

Ankoraŭ hodiaŭ ekzistas sistemo de terurigo por varbi laboristojn aŭ ŝtelado de virinoj kaj infanoj. Anstataŭ kompreni la moralan respondecon de pli instruitaj gentoj kontraŭ malpli kleraj, multaj tiel nomitaj „civilizitoj" vojaĝas malproksimen por gajni monon per ĉiu ajn rimedo. Kion ili ne kuraĝus fari hejme, tion ili sentime faras tie kaŝe.

Al malfeliĉaj homoj alikoloraj ili alportas venenigan alkoholon, ili subskribigas hontajn kontraktojn de ili nelegeblajn, ili forrabas la kampojn, ili punas sen juĝado, ili mortigas senpune, ili laborigas per minacoj aŭ per sistema ŝuldigo, ili transloĝigas senrajte, ili sentigas ĉiel absolutan malrespekton al ilia homeco. Bestoj, laboriloj, ĝuilinoj, militiloj, jen kiel ili konsideras la homojn sur kies teron ili venis por riĉiĝi rapide.

Tia skandalo ne tiel facile okazas se la lumo de publika kontrolo konstante ĵetas lampan radion al tiu kaŝita agado. Pro tio fondiĝis la Internacia Oficejo por Protekto de l' Indiĝenoj en Ĝenevo apud la jam ekzistanta Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Unu kiel la alia celas nur homamon kaj staras ekster politikaj aŭ religiaj konfliktoj havante sian sidlokon en lando senkolonia, do senpartia en tiaj aferoj.

En diversaj landoj ekzistis jam naciaj asocioj kun simila celo, sed mankis ĝis nun internacia centro tute neŭtrala. La Ĝeneva Oficejo, ankoraŭ tre modesta kaj senmona, estas gvidata de Direkta Komitato, kie sidas homoj kiel René Claparède, prezidanto, fama juristo profesoro Paul Moriaud, antropologa scienculo prof. Pittard, egiptologisto Edouard Naville, ekonomistino Emily Balch, lingvistoj D-roj Edmond Privat kaj A. Velleman ktp.

El ĉiuj sciencoj rilataj al homoj kaj homa vivo venis kuraĝaj komitatanoj, pretaj oferi iom da tempo kaj forto por afero sankta. Venis la tempo kuncentrigi ĉiujn apartajn agadojn por ĉesigi hontaĵon, tiom pli abomenan, ĉar ĝi estas kaŝata de la vasta publiko.

Venis la tempo disvastigi tra la mondo la ideon pri egaleco de la rasoj, pri respondeco de la pli kleraj al la ceteraj, pri digneco de l' homoj sub ĉiu klimato kaj haŭtkoloro. Venis la tempo direkti la radiojn de potenca lumigilo sur tiujn kaŝitajn ekspluatejojn kaj kuraci la malsanon per publika kontrolo. Nur tio ĉesigis la turmentadon por kaŭĉuko en Kongolando kaj Peruo antaŭ kelkaj jaroj. Antaŭe nur kelkaj misiistoj aŭ vojaĝantoj sciis kaj la skandalo daŭris. Kiam la faktoj estis konataj en la tuta mondo, la registaroj devis agi kaj la turmentado haltis.

La Internacia Oficejo celas ne nur kolekti seriozajn dokomentojn pri faktoj, sed ankaŭ disvastigi novan idealon en tiu fako. Ĝi klopodas interrilatigi ĉiujn naciajn societojn laborantajn por simila celo. Ĝi deziras fondigi novajn ligojn tie, kie neniu ekzistas. Ĝi deziras interesi penseman kaj noblan rondon de internacia publiko al tiu afero.

Pro tio kaj ankaŭ pro neŭtraleco **ĝi elektis la lingvon Esperanto** por eldoni sian unuan bultenon. Ĝi deziras daŭrigi tiun eldonadon kaj pravigi ĝin en la okuloj de la naciaj ligoj per multaj aliĝoj el la esperantista legantaro. Se ĝi ricevos almenaŭ cent jarkotizaĵojn je minimume 1 fr. svisa kun mencio „Esperanto" ĝi presigos en tiu lingvo siajn ses numerojn por 1923 kaj daŭrigos laŭ la sukceso, konsiderante la lingvon de Zamenhof kiel oficialan por la Oficejo kaj anoncante tion al ĉiuj naciaj ligoj. Same ĝi danke rilatus kun ĉiuj personoj aŭ grupoj, kiuj estus pretaj interesiĝi al sia celo por informado aŭ propagando. Tre utila estus presigo de malgrandaj notoj en nacia gazetaro ĉiutaga, misiista, socia ktp. (vidu paĝon 4). Al ĉiuj bonvolaj homoj ni petas pripensi kaj ni antaŭdankas pro la helpo.

# La Internacia Oficejo por la protektado de indiĝenoj.

(Kolorrasoj)

## Niaj principoj.

1. **Ni kredas** ke justeco kaj rajto ne povas regi inter popoloj per la uzo de perforto, per la ekspluatado de la malfortuloj aŭ per la rego kun egoista celo de nacio super alia.
2. **Ni kredas** ke la homaro estas ligita per politikaj, ekonomiaj, sociaj, spiritaj kaj moralaj ligiloj tiaj ke plej granda interesa solidareco devus rezulti.
3. **Ni kredas** ke la plej forta kaj kulturita raso havas grandajn respondecojn kaj devojn kontraŭ malfortaj kaj nekulturitaj rasoj.
4. **Ni kredas** ke kiam la civilizo de forta kaj organizita raso estas alportita al malfortaj kaj nekulturitaj rasoj, sen sento de respondeco kaj kiam tiuj rasoj ne povas ĝin asimili per taŭga edukado, tiam tiu civilizo ilin mortigas aŭ ilin ekspluatas.
5. **Ni kredas** necese, ke meze inter civilizita kaj ekspluatanta raso, stariĝu tiuj kiuj konvinkiĝas pri la situacio kaj donu la manon al la malfortaj rasoj, por helpi ilin sin liberigi de la ekspluatantoj kaj helpi ilin plialtiĝi socie kaj politike.

## Niaj celoj.

1. **Disvolvigi** en la civilizitaj popoloj la senton je respondeco ŝuldata kontraŭ aliaj popoloj.
2. **Defendi** meze de la blanka raso la homojn de koloraj rasoj kontraŭ ĉia nejusta leĝo kaj precipe kontraŭ ĉia nejusta traktado.
3. **Kunordigi** la klopodojn de la naciaj ligoj por protekto de indiĝenoj kaj starigi daŭrajn rilatojn inter ili.
   **Krei** novajn ligojn aŭ komitatojn por protektado de la indiĝenoj, en landoj kie tiaj organizaĵoj ne ekzistas kaj kie ili devus ekzisti.
4. **Kunlabori** laŭeble kun la aliaj internaciaj asocioj celantaj la bonon de la indiĝenoj.
5. **Organizi** centran oficejon por informado kaj dokumentado pri la indiĝenaj aferoj.
6. **Starigi** kompletan bibliografion pri la indiĝenaj demandoj.
7. **Utili** kiel konstanta oficejo al la Internacia Kongreso por Protektado de Indiĝenoj, prepari ĝiajn kunsidojn, ilin kunvoki kaj sekvi ĝiajn decidojn.

## Niaj agrimedoj.

1. **Publikigo** de unu aŭ pluraj informbultenoj.
2. **Publikigo aŭ disvastigo** en la tutmonda gazetaro de artikoloj pri la indiĝenaj demandoj.
3. **Organizo** de internaciaj kongresoj por protekto de indiĝenoj.
4. **Organizo** de kunvenoj, paroladoj ktp.
5. **Konsento** kun la neoficialaj internaciaj organizaĵoj havantaj celojn similajn je niaj, por atingi la plej kompletan agunuecon.
6. **Klopodoj** ĉe oficialaj internaciaj organizaĵoj (Ligo de Nacioj, Internacia Laboroficejo, ktp.) kaj gravaj personoj por akiri plibonigojn de la leĝoj priindiĝenaj, kaj atentigi pri la difektoj de ilia apliko.
7. **Enketoj** pri la diversaj indiĝenaj demandoj.

## Aganta Komitato de la I. O. P. I.

S-roj René Claparède, Prezidanto.

L. Ferrière, Prof. P. Moriaud, Prof. Eug. Pittard, D-ro A. Velleman — Vicprezidantoj

Edouard Junod, sekretario-kasisto.

F-ino B. Balavoine
F-ino Balch
S-roj Balmas
Prof. J. Breitenstein
Aug. Brindeau
Th. Burnier

S-roj Ch. W. Châtelain
Prof. Al. François
H. A. Junod
Eug. Mercier-Glardon
D-ro Edm. Privat
S-ino A. Privat-Fallot.

Adreso de la I. O. P. I.: 30, rue Verdaine, Genève, Svislando.

## Ligoj aŭ Naciaj Komitatoj sin okupantaj pri la Protekto de la Indiĝenoj.

**Britlando:** Anti-Slavery and Aborigines Protection Society, Denison House, Vauxhall Bridge Road, London SW.

**Italio:** p. A.: M. le Commandeur Simonetti ĝenerala sekretario, Palazzo Altempo, Via San Apollinare, Roma.

**Svislando:** p. A. M. Eug. Mercier-Glardon, 29 bis, Ch. de Miremont, Genève.

**Francio:** Commission Coloniale de la Ligue des Droits de l' Homme, p. A. M. Félicien Challaye, 11 bis rue Thiers, Le Vésinet (S. et. O.)
Société Antiesclavagiste de France 23, rue du Cherche-Midi, Paris.

**Usono:** Friends of the Indian and other dependent peoples, Mohonklake, Ulster Country, New-York.

**Peruo:** Patronato de la Raza Indigena. Illust-mo Sign. Emilio Lisson, Calle del Milagro, Lima.
Comité „Pro Dezécho Indigena" S. Samuel Nuñez. Casilla del Correo 1570, Lima.

**Aŭstralio:** Association for Protection of Native Races in Australia and Polynesia, 242, Pittstreet, Sydney. N. S. W.

## Internacia Kongreso por protektado de la Indiĝenoj.

Celante doni al la amikoj de la indiĝenoj okazon sin renkonti unuan fojon kaj diskuti la temojn kiuj interesas ilin, la komitato de la „Internacia oficejo por protektado de la Indiĝenoj" decidis sugestii renkonton en „Internacia Kongreso por protektado de la Indiĝenoj."

Pro la grandaj distancoj kiuj disigas nin unu de la aliaj, estus malfacile organizi kontentige tiun kongreson tuj.

Tamen, estas absolute necese ke unua kunveno okazu tiun ĉi jaron por interaranĝi niajn klopodojn en la entreprenata batalo kaj por organizi la kongreson.

Tiu kunveno okazos la 1.—2.—3. septembro 1923 en Genève.

Ĝi elektos Internacian Agan Komitaton kaj Internacian Honoran Komitaton.

Ĝi ekzamenos plie la demandon pri protektado de la indiĝenoj, la organizon de la naciaj komitatoj kaj de la loka aganta komitato.

Ĉiu asocio aŭ privatulo interesiĝanta pri la protektado de indiĝenoj estas petata sendi al ni siajn sugestiojn.

## La Koloniaj Mandatoj.

„Al la kolonioj kaj teritorioj kiuj sekve de la lasta milito ĉesis esti sub regado de la ŝtatoj kiuj regis ilin antaŭe, kaj kiuj estas loĝataj de popoloj ne ankoraŭ kapablaj rezisti mem kontraŭ la kondiĉoj de la moderna mondo, al tiuj estu aplikata la principo ke la bonstato kaj disvolviĝo de tiuj popoloj formas sanktan taskon de civilizacio, kaj ke asekuroj por la plenumo de tiu tasko estu entenataj en tiu ĉi traktato.“

Tiu principo de justeco kaj bonvolo, se ĝi estos aplikata, malfermos novan ĉapitron en la historio de la traktado de la kolorrasoj per la blankuloj.

La Potencoj kiuj estis ŝarĝitaj de mandato sur la antaŭaj germanaj kolonioj estas: Brita Imperio (Anglio, Sud-Afriko aŭ Sud-Afrika Unuiĝo, Aŭstralio, Nov-Zelando), Francio, Belgio kaj Japanio. Loko mankas por pli da detaloj. Ni ekzamenos hodiaŭ nur la manieron laŭ kiu Sud-Afriko uzis sian protektan mandaton sur la Hotentotoj.

## La Komisiono de Mandatoj.

Laŭ la sama artikolo XXII de la Interkontrakto, daŭra komisiono estos devigata ricevi kaj ekzameni la jarajn raportojn de la mandathavantaj ŝtatoj kaj doni al la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj sian opinion pri ĉiuj aferoj rilataj al la plenumo de la mandatoj.

Nur dum la jaro 1923 ĝi estos preta doni ĝian opinion pri la ara mortigo de Hotentotoj rakontita en ĉi suba artikolo.

## Bibliografio.


John H. Harris:

**A New Colonial era for dependencies: „Possession“ or „Trusteeship“?** Issued by the Anti-Slavery and Aborigines Protection Society-Denison House, Vauxhall Bridge Road, London.

R. Claparède et Dr. H. Christ-Socin:

**L' Evolution d' un Etat philanthropique** (l' Etat indépendant du Congo) avec une carte et trois planches hors texte. Genève 1909. Fr. 2,50.

R. Claparède et Eug. Mercier-Glardon:

**Un bureau international pour la défense des indigènes.** Genève 1917. Fr. 0,50.

Edouard Junod:

**Le Bureau International pour la défense des Indigènes.** Extrait de la „Revue Internationale de la Croix-Rouge.“ Genève 1922. Fr. 0,50.

Ch. W. Châtelain:

**Socialisme patriotique et patriotisme international.** Ĉapitro estas dediĉita al la indiĝenoj sub tiu titolo: Le service civique, levier d' émancipation des races indigènes 2ème édition. Genève 1922. Fr. 1,—.


Tiuj libroj estas aĉeteblaj en la Internacia Oficejo por Protektado de Indiĝenoj, 30, rue Verdaine, Genève, Svislando.

## La „Colour Bar“.

Oni nomas „Colour bar“ teorion laŭ kiu la indiĝenoj de iuj kolonioj aŭ landoj estas malakceptataj en iuj oficoj aŭ senigataj de iuj rajtoj pro la sola motivo ke ili estas kolorhaŭtuloj.

Ekzistas politika „colour bar“. Ĝi ekzistas en Sud-Afrika Unuiĝo kie la nigruloj ne povas esti elektitaj membroj de la Parlamento.

Ekzistas ekonomia „colour bar“. En Johannesburg la indiĝenoj en orminejoj ne povas esti akceptitaj en iuj difinitaj laboroj, eĉ se ili estus kapablaj plenumi ilin.

Ekzistas socia „colour bar“, ankoraŭ pli severa ol la aliaj, kiu malpermesas iujn sociajn interrilatojn.

La afero de la „colour bar“ estas tre komplika. La sola maniero ĝin solvi estas konsideri la kompetentecon kaj la valoron de individuo kaj ne lian haŭtkoloron.

## La Ŝibalu.

Oni nomas per tiu vorto en Mozambiko, la devigan laboron kiun la indiĝenoj devas plenumi laŭ ordono de la aŭtoritatoj.

La „Ŝibalu“ povas konsisti el kelkaj labortagoj por la riparo de la vojoj kiujn la indiĝenoj ankaŭ uzas. Tiel tiu imposta laboro estas leĝa.

Sed povas okazi ke la registaro rekrutigas indiĝenojn por grandaj laboroj necesaj por la disvolviĝo de la lando: konstruo de kajoj, administraj konstruaĵoj ktp. Se laboristoj mankas, oni konsentas ke estu necese uzi tiun rimedon, sed tiam la salajro devus esti normala t. e. ne pli malalta ol tiu pagita por tiaj laboroj en la lando.

Tria speco de „Ŝibalu“ estas la deviga laboro profite je la kolonistoj. La kolonia registaro devus uzi tiun aranĝon nur kiam ĝia neceseco estas vere pruvita; ĝi devus postuli ke la kolonistoj pagu la normalan salajron, ke la laborperiodo ne estu pli ol 3 sinsekvaj monatoj en periodo 2 jara, kaj liberigu ĉiujn indiĝenojn libere laborantaj por blankuloj aŭ praktikantan regulan metion.

## Enketoj

**faritaj nuntempe de la Internacia Oficejo por Protektado de la Indiĝenoj.**

La Sklaveco en Abisenio kaj najbaraj landoj.

La imposta laboro en kolonioj kaj Sud-Ameriko.

La enmigrado de Hindoj en Afriko.

Ni estus tre dankemaj al ĉiuj personoj interesiĝantaj pri la rajtoj de la kolorindiĝenoj, se ili bonvolus sendi al ni informojn kiujn ili posedas.

Adreso: Bureau International pour la Défense des indigènes, Rue Verdaine 30, Genève, Svislando.

Detranĉu!

# Helpu la Internacian Oficejon por protekto de Indiĝenoj (I. O. P. I.)

**30, rue Verdaine, Genève, Svislando.**

Esperantistoj, diskonigu la principojn de justeco kiuj estas la bazo de nia agado — Helpu nian agadon:

a) abonante nian esperantan bultenon kaj konigante ĝin.

b) sendante donacon favore de la Internacia Oficejo por Protektado de la Indiĝenoj.

**Turnu la paĝon kaj eltranĉu la aliĝilon.**

## La sistemo de „mandatoj“.

La packontrakto de Versailles kreis por diversaj koloniaj landoj novan sistemon, konatan sub la nomo „sistemo de mandatoj“. Anstataŭ esti tute simple aneksataj de la venkintaj regnoj post la mondmilito, la kolonioj de l' antaŭa germana imperio estis konfidataj al diversaj regnoj por administrado en la nomo de la Ligo de Nacioj.

Laŭ la statuto de la Ligo la „mandato“ signifas „sanktan taskon de civilizado“, protektadon kaj edukadon de la loĝantaro kun la celo ĝin prepari por tempo, kiam ĝi kapablos regi sin mem. La fidata administranta regno, aŭ „mandatulo“ estas responda antaŭ la Ligo de Nacioj kaj ĉiujare devas prezenti al ĝi raporton pri sia administrado. Regularo por ĉiu mandato estas fiksita de la Ligo kaj akceptita de la mandatulo.

Specialista komisiono de sendependaj homoj, inter kiuj sidas virino, ekzamenas la raportojn kaj, sidanta kvazaŭ supera kontrolanto, kunvokas antaŭ si la komisiatojn de la mandatulo por ilin demandadi, gratuli aŭ riproĉi laŭ la bezono.

En tio la sistemo ŝanĝis ion en la mondhistorio ke la unuan fojon oficialaj reprezentantoj de grandpotencoj devas sidi kiel ekzamenatoj antaŭ juĝantaro kaj respondi pri la maniero en kiu ili regis afrikajn nigrulojn. Por tiuj teritorioj almenaŭ ĉesis laŭjure la simpla ekspluatado de homoj.

Kompreneble la sistemo estas ankoraŭ tre nova kaj la kontrolo ankoraŭ malprofunda. Tamen ĝi jam ekinfluis ne nur la submandatajn koloniojn, sed eĉ iom la ceterajn. La ideo de konfido anstataŭ simpla posedo jam montras progreson en la tuta fako. Tamen urĝus, ke la bela ideo paŝu antaŭen de la vortoj al la faktoj. Tion akcelas publika movado, celata per la agado de la Internacia Oficejo por protekto de l' indiĝenoj.

## En Maroko.

La franca kolonia polico arestis en Casablanca vendiston de sklavoj, kiu komercis je virinoj kaj geknaboj de l' apudaj regionoj.

## En Tanganika Teritorio.

En la antaŭa „Orienta Afriko“, nun administrata kiel brita mandato de la Ligo de Nacioj, oficiala dekreto liberigis ĉiujn sklavajn domservistojn, entute 185.000 homojn.

*Noteto presinda en gazetaro.*

*Internacia Oficejo por Protekto de l' Indiĝenoj stariĝis en Ĝenevo, la sidloko de Internacia Ruĝa Kruco kaj de Ligo de Nacioj. Ĝi celas disvastigi la ideon pri la respondeco de civilizitaj gentoj kontraŭ malpli kleraj kaj kunordigi la agadon de la diversaj naciaj ligoj fonditaj por batali kontraŭ kaŝitaj formoj de sklaveco truditaj al kolorhaŭtuloj.*

*Ĝia direktanta komitato entenas konatajn juristojn, scienculojn kaj filantropojn. La unua internacia bulteno de la Oficejo aperis en la neŭtrala helpa mondlingvo Esperanto, jam uzata de diversaj internaciaj oficejoj kiel ekzemple la Laboroficejo, kiu eldonas ĉiusemajnajn informojn en tiu lingvo. La nova Oficejo por Protekto de l' Indiĝenoj sidas en historia domo ĉe 30 rue Verdaine, Genève.*

## Ĉe la Hotentotoj.

Ĉe la III[a] kunveno de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo ekkoniĝis ekzemplo de kolonia skandalo, kiu sendube okupos la mandatan komisionon ĉe sia venonta kunsido. Tio estis la persekuto al Hotentotoj en Sudokcidenta Afriko. Jam, kiam tiu teritorio estis ankoraŭ germana kolonio, okazis tie ribelado kaj puno per terura milito, kiu preskaŭ duonigis la loĝantaron. Nun la lando estis konfidata de la Ligo de Nacioj al Sudafriko, la regno de la Boeroj ligita al Brita Imperio.

Oni rajtis esperi ke sub la alta protektado de la Ligo la loĝantaro ĝuus pacon kaj feliĉon, sed la loka administranto ĉagrenis tiun mizeran genton per troaj taksoj. Tiuj Hotentotoj, treege malriĉaj, ofte senvestaj kaj sendomaj, havas nur unu solan posedaĵon en la mondo: sian brutareton kaj la necesajn hundojn por ĝin gardi. Nu la boera administranto decidis altegajn taksojn por hundoj

| | |
|---|---|
| por 1 hundo | 1 sterlinga funto |
| 2 hundoj | 2 sterlingaj funtoj, 10 ŝ. |
| 3 „ | 4 „ „ 10 ŝ. |
| 4 „ | 7 „ „ |
| 5 „ | 10 „ „ |

Ankaŭ oni malpermesas al la forflugintaj ĉefoj de l' antaŭmilita ribelado ke ili revenu hejmen. Kelkaj tamen revenas. La mizeruloj plendas pri la taksoj. Oni minacas mortigi la hundojn. La popolo protestas. Oni arestas gvidantojn kaj sendas militistaron kun pafiloj, artilero, bombĵetantaj aeroplanoj kaj tiel plu.

Preskaŭ senarmaj, la Hotentotoj apenaŭ povas sin defendi kaj post dekunu tagoj da buĉado ili estas venkitaj, ilia ĉefo Abraham Morris mortvundita kaj preskaŭ ĉiuj restantaj geviroj kaj infanoj militkaptitaj.

Kontraŭ tia „administrado“ elokvente plendis ĉe la Ligo de Nacioj diversrasaj delegitoj kaj interalie la nigra oratoro Dantés-Bellegarde, ministro el Haïti Respubliko. La reprezentantoj de Sudafriko promesis severan enketon pri la tuta afero. Kun granda malpacienco ĝin atendas ĉiuj amikoj de l' indiĝenoj kaj ankaŭ amikoj de la Ligo de Nacioj, ĉar estis honto ke povis okazi tia afero sub la sankta signo de la mandatoj, kiuj kontraŭe estis fonditaj de Wilson por ĉesigi ĉiun similan trouzon. Sed estas ankaŭ rimarkinde ke antaŭe tia afero povus okazi tute senproteste, dume nun ĉiuj Liganoj rajtas plendi kaj la tuta afero tuj kreas tian skandalon, kian neniu administranto ŝatos riski estonte. Sed eĉ por konigi la faktojn al la Ligo estas bezonata taŭga organizaĵo kiel la Internacia Oficejo, kiu estu preta kolekti ĉiujn seriozajn dokumentojn.

## En Abisenio.

Imperiestra dekreto de 28. Junio 1922 malpermesas vendadon kaj aĉetadon de sklavoj. Arestataj vendistoj pafis al policanoj kaj estis kondamnitaj al morto per publika pendigo. Estas espereble ke la honta komercado ekĉesos, ĉar en tiu lando ĝi tro floris ĝis nun. Post ripetitaj plendoj de l' amikoj de l' indiĝenoj, la franca maristaro disponigis ŝipon por gardadi sur maro malhelponte ĉian eksteran komercadon de sklavoj al Abisenio.

## En Novaj Hebridoj.

Tie la nenormala sistemo de miksa duregna kunregado ne faciligas la gardadon kontraŭ trouzoj. Importado de alkoholaĵoj kaj rabado de homoj por ekstera laborigo ankoraŭ floras.

Detranĉu!

# Aliĝilo

**sendota al la „Bureau International pour la Défense des Indigènes, 30, rue Verdaine, Genève (Svislando).**

a) *La subskribinto abonas al la esperanta bulteno „Por la Indiĝenoj“ por la jara prezo de (1 sv. fr.) Sv. fr. ..................

a) *La subskribinto dezirante helpi la laboron de la „Internacia Oficejo por protekto de la Indiĝenoj“ sendas donace ĉekon de .................. Sv. fr. ..................

*) Streki kio ne taŭgas.